



ESPERANTO

NORMANDA BULTENO

ESPERANTO - NORMANDIE

Redaktas: Pierre QUILLAUD 16, rue Lt Vaisseau Paris
76120 LE GRAND-QUEVILLY Tel. 02 35 69 66 09
Abon-Kotizoj: 8 Eŭroj al Esperanto-Normandie
CCP 283 - 40 H. ROUEN

AGO-TAGO POR ESPERANTO

Kiam vi ricevos tiun bultenon, komenciĝos aŭtuno. Lernantoj kaj studentoj estos jam komencintaj novan lernjaron. Ankaŭ laboristoj kaj oficistoj estos relaborintaj de unu monato.

Por geemeritoj, septembro estas ankoraŭ feria monato kun belaj sunaj tagoj sed malpli kosta kaj pli trankvila. Pro tio, monato por rekomenci esperantistajn agadojn estas oktobro. Vi legu ĉi-sube la alvokon de Renato Corsetti Prezidanto de U.E.A. :

"Antaŭ jam longa tempo oni decidis dediĉi la unuan sabaton de oktobro al la "ago-tago", tio estas al tago de agado por informi pri Esperanto kaj pri la ideoj de la movado por la internacia lingvo.

Ĉi-jare tiu unua sabato estas la 7-a de oktobro 2006.

Kiel kutime la estraro de UEA invitas ĉiujn partopreni la ago-tagon je la plej alta agad-nivelo ebla laŭ la lokaj kondiĉoj. Kvankam ĝenerale vi prezentos Esperanton laŭ la normalaj ideoj de nia movado, kie neceso aparta temo, tiu povas esti kunligita kun la rezolucio de la Universala Kongreso en Florenco: "Esperanto kiel rimedo por daŭropova pluvivo de ĉiuj lingvoj kaj de ĉiuj kulturoj".

Fakte ni volas defendi ĉiujn lingvojn, la naciajn lingvojn grandajn kaj malgrandajn, la malplimultajn lingvojn, kaj de historie ĉeestantaj kaj de enmigrintaj grupoj. Tie kuŝas nia malsameco rilate al tiuj, kiuj nur okupiĝas pri efikeco en komunikado de la supro al la malsupro (internacie kaj ensocie), kaj kiuj ŝovas la pezon de la komprenado kaj la problemojn de lingvo-lernado al la internacie kaj ensocie malplej fortaj hom-grupoj.

Dum la komitatataj diskutoj en Florenco estis reprenitaj la konsideroj pri la neceso havi malsamajn ago-tagojn en malsamaj mondo-partoj, ĉar oni devas konsideri ĉefe la malsamajn momentojn, en kiuj finiĝas la ferioj kaj rekomenciĝas la labor-jaro. Tio estas nun efektiveginda pro la reala tutmondeco de Esperanto. En ĉi tiu transira jaro okazu diskutoj en ĉiuj mondopartoj inter esperantistoj pri la plej bona periodo kaj tago en la koncerna mondoparto kaj ankaŭ okazu apartaj provoj de ago-tago en la elektita periodo. Tiuj kromaj ago-tagoj aldoniĝu al la nun anoncata tago.

Cetere en Eŭropo mem oportunus ligi la ago-tagon al la dato de la **26-a de septembro, Eŭropa Tago de Lingvoj**, kiu ne estas malproksima de la unua sabato de oktobro. Ni invitas ĉiujn esperantistojn loĝantaj en la landoj de la Konsilantaro de Eŭropo ligi Esperanton al la jam antaŭviditaj lingvaj eventoj, al kiuj oni povas facile kaj libere aldoni tiujn pri Esperanto.

La devizo de la Eŭropa Tago de Lingvoj estas: "Celebri lingvan diversecon, multlingvecon kaj dumvivan lingvolernadon". Ni akceptas ilian devizon kaj sincere aplaŭdas je ĝi, sed ni devas kompreni al ili kaj ĉefe al niaj kuncivitanoj, ke lingva diverseco kaj multlingveco povas flori stabile kaj pluekzisti nur se oni permesos al Esperanto ŝirmi la ceterajn lingvojn. Esperanto povas fari tion, ĉar pro manko de grupo, kiu utiligas ĝin por altrudi apartan kulturon kaj en la fino la superregadon de la anoj de tiu kulturo, ĝi estas la sola internacia lingvo *ne-lingvo-vora*."

Resume, la agado de niaj kluboj povos okazi, ĉu la 26a de Septembro, Eŭropa Tago de la Lingvoj, ĉu sabate 7a de Oktobro, tago decidita de UEA. Niaj agadoj povas esti diversaj: surstrataj disdonoj de informiloj, organizado de prelegoj, aperigo de artikoloj en regionaj gazetoj, malfermo de kursoj. Ni ĉiam batalu kontraŭ la falsa aserto ke Esperanto volas detrui ekzistantajn lingvojn. Ni persiste argumentu ke Esperanto estas la plej bona solvo por defendi ilin kontraŭ superlingvoj kiuj volas vori ilin.

Bonan kuraĝon

Petro KIJU

VIZITO AL GEAMIKOJ

Mi ne scias ĉu multaj samideanoj de nia regiono profitis somerajn feriojn por praktiki Esperanton. Iu skribis al mi ke li intencis iri al Plouezec por perfektigi sian lingvoscion. Alia sendis al mi poŝtkarton de Village Vacances "Le Lazaret" en Sete kie okazis seminario kaj kursoj. Alia deziris veturi al Florenco por partopreni la Universalan Kongreson kiun ĉeestis 2000 gekongresanoj el kiuj estis 287 Francoj. Kiom da Normandoj inter tiuj Francoj? Mi bedaŭras ke neniu sendis al mi raporton pri siaj ferioj kaj mi memorigas al ĉiuj ke ankaŭ vi ĉiuj estas redaktoroj de tiu bulteno!

Mi mem ne partoprenis kongreson, seminarion aŭ alian esperantistan aranĝon. Tamen mi bone praktikis Esperanton kun germanaj geamikoj.

De kelkaj jaroj, mi perrete korespondas kun loĝanto de la urbo Laatzen kiu estas ĝemelita kun mia urbo Grand Quevilly. Laatzen estas ĉirkaŭurbo de Hanovro kiu estas ĝemelita kun Rouen. Hanovro situas en norda parto de Germanio en lando "Nieder-Sachsen" (Malalta Saksio). Post daŭra korespondado, venis la deziro konatiĝi. Estas mia korespondanto kiu invitis nin. Li informis nin pri taŭgaj datoj kaj horoj por profiti plej malmultekostajn flugvojaĝojn kaj atendis nin ĉe flughaveno.

Nia amiko kaj lia edzino plej varme kaj elkore akceptis nin kiel malnovaj geamikoj. Bela vetero ebligis al ni manĝojn sur teraso de ilia domo kun vido al bela naturo.

La unuan tagon, ni malkovris Hannover. La urbo (pli ol 520.000 geloĝantoj) estas moderna ĉar ĝi estis grandparte detruita dum la milito. Tamen, ni povis suprengrimpigi al la kupolo de la urbodomo de kie ni povis rigardi diversajn monumentojn, ĝardenojn, malnovan urbodomon, muzeojn, diversajn preĝejojn, inter kiuj la preĝejo de la merkato kiu estas konstruita el brikoj, laŭ la gotika stilo de Norda Germanio. Hanovro estas trairata de rivero Leine kaj de kanalo de Mittelland. En Hanovro, ni vizitis maljunajn esperantistojn kiuj rakontis al ni pri la vivo dum kaj antaŭ la milito, kiam rifuzo meti sur la fenestron la flagon de la reganta partio estis sufiĉa por havi sian nomon sur listo de suspektatoj!

Niaj geamikoj veturigis nin al aliaj vizitindaj urbetoj kie atendis nin samideanoj kiuj akceptis nin kun granda plezuro. Laŭ eblecoj, ni manĝis ĉe ili, aŭ en tipaj restoracioj. Poste, ni iris al kafejoj por trinki kafon kaj manĝeti kukojn.

Ni vizitis Hildesheim, urbo dum milito detruita sed kun historia centro bele rekonstruita kun multaj preĝejoj, katolikaj aŭ protestantaj, belegaj domoj kun traboj (colombages). Ni ankaŭ estis bone akceptitaj en Schwarmstedt de amiko tre sperta pri fungoj. Ni promenis tra la naturo, sur agrablaj padoj. Ni konstatis ke "hundo-manio" estas malpli granda ol en Francio ĉar ni ne bezonis ĉiam rigardi teren por paŝi! La urboj estas puraj. La nombro da biciklantoj estas tre grava ĉar multaj vojetoj por ili ekzistas, bone apartigitaj de aŭtoj.

Dimanĉe, ni vizitis Hameln, "der Rattenfängerstadt" kio signifas la urbo de ratkaptinto! Ĝi estas tre turisma urbo kun multaj vizitantoj; ni spektis sur estrado starigita sur la ĉefa placo de la urbo plenaeran ludon pri la legendo de la ratkaptisto kiu per sia fluto kondukis ratojn droniĝi en Weser rivero. Malbone pagita de la burĝoj, li venĝis sin poste forkondukante la infanojn eksteren de la urbo kien ili neniam revenis. La fratoj Grimm disfamis tiun popolan legendon tra la mondo. De la mezo de Majo ĝis la mezo de Septembro, tiu legendo estas dum duonhoru, ludata, ĉiudimanĉe. En Hameln, ni vizitis la urbon kun membroj de la esperantista klubo kiu estas tre aktiva kaj eldonas ĉiumonate *la "RATPAPTISTA KURIERO"* n, *Informilo de la Ratkaptista Bando* Nia vizito estis jam anoncita en tiu bulteno.

Ni sentis nin en familia etoso. Esperanto ebligis tiun miraklon. Dankon al geamikoj kiuj invitis nin Dankon al la aliaj kiuj vizitigis sian urbon kaj donis al ni la deziron reveni en landon kie estas agrable vivi.

Petro kaj Tereza

Finsemainaj staĝoj por studi kaj praktiki la lingvon:

Ili estas organizataj de Esperanto 44

- Staĝo en Nort sur Erdre (norde de Nantes) la 28an & 29an de Oktobro en Lycée de l'Erdre
- Staĝo en St Aignan de Grand Lieu (sude de Nantes) la 3an kaj 4an de Februaro 2007

Informoj kaj aliĝoj ĉe Ferdi VINCE "Hejme", 13 rue du Dr Schweitzer 44600 St Nazaire
Tél. 02 40 70 46 74

Reorganizado de Esperanto-Normandie daŭras:

Depost la ĝenerala kunveno en Port-Bail, la 9an de Aprilo, ne kunvenis la estraro. Malgraŭ tio, diversaj kontaktoj okazis:

Kiel bultenisto, mi jam povas informi vin ke post pluraj alvokoj, nova redaktanto sin proponis; li ne laboros sola sed kun helpo de redakcia komitato. El tio rezultos bulteno pli bele prezentita kun artikoloj pli interesaj. La Decembra estos la lasta bulteno farita de mi.

Kiel kasisto, sin proponis samideano kiu estis tre aktiva en la normanda federacio kaj en la rŭena klubo; pro tro streĉa laboro kaj pro manko da tempo, li ne plu povis aktivi por Esperanto dum multaj jaroj. Nun li emeritiĝis kaj deziras helpi nian asocion.

Laŭ la statutoj, tiuj ŝanĝoj devos antaŭe esti akceptataj de la estraro

Estantaj UNIVERSALAJ KONGRESOJ:

La venontaj Universalaj Kongresoj okazos en Yokohama en 2007
kaj en Rotterdam en 2008 pro la centjariĝo de UEA

EN NIAJ KLUBOJ

Les Andelys (27): Sylvie Bonnet komunikas:

Nia klubo kunvenas por konversacii en Maison des Associations, 2-foje monate
Proksima kunveno, komence de Oktobro

LISTO de KOTIZINTOJ por 2006

Rigardu ĉu via nomo aperas en ĉi-suba listo:

Bataille, Bessière, Caron, Chalm, Colbert, Corrieu, Dubois, Dubuc, Dufeu, Duval, Dufresne, Esp-Cotentin, Evrard, Gibert, Guérault, Guerre, Guilmet, Hébert, Huet, Jean, Jouvin, Klein, Lamy, Langeois, Lardeur, Lebrun, Lecouvreur, Lehericey, Lemarchand, Lesueur, Lévesque, Lévy, Loisel, Magerel, Michaud, Nardin, Nicolas, Pottier, Quillaud, Rauch, Rousseau, Rousseau-Pellico, Robiolle, Sénécal, Séry, Tailpied, Tanguy, Touileb, Zilliox

Se via nomo ne estas en tiu listo, bonvolu ne prokrasti la pagon de via abonkoto. Tiel vi helpas la kasiston kiu ne deziras sendi al vi admonleteron!

ĜEMELECO INTER MALSUPRA SAKSIO KAJ NORMANDIO

Sub la sama titolo, mi jam informis vin en bulteno N°227 ke Bretonio kaj Saksio (Ĉefurbo: Dreseno) estas partneraj regionoj Ĉiu regiono eldonas bultenon: La Verda Triskelo por la Bretonoj, La Verda Saksofono por la Saksoj. Ili interŝanĝas siajn bultenojn sed ili ankaŭ eldonas unu aŭ dufoje en la jaro komunan bultenon

Samideanoj loĝantaj en Malsupra Saksio (Ĉefurbo Hanovro) deziras fari la samon kun Normandoj

En 2006 la komuna temo estis "Vivo en kamparo"

Ĉi sube, legu artikolojn aperintajn en la komuna bulteno de Bretonoj kaj Saksoj

PASINTA TEMPO EN LA KAMPARO

Kiam mi pensas pri la pasinta tempo, kiam mi estis infano en la bretona kamparo, ŝajnas al mi ke tiam estis Mezepoko, ĉar la vivmaniero multe ŝanĝiĝis pro teknikaj progresoj kaj iomete pro humana pensmaniero.

En tiu tempo, kiam ankoraŭ vivis mia avino, - ŝi mortis en 1946-, la laboro en la farmo estis ege peniga, precipe por virinoj, kaj eĉ infanoj devis partopreni!

La domo estis sen komforto: nek elektra lumo, kurento, fridujo; nek hejtilo, gasformo; nek banĉambro, necesejo.

Mi memoras matenojn: mi vekiĝis pro bruoj en la domo, la lampeto el latuno* heligetis la ĉambron de mia avino, kun kiu mi dormis, en la sama lito. Ĉiam ŝi ellitiĝis unua: ŝi zorgis pri fajro en la kameno, kiel vestalo. Por prepari kafon, tie ŝi boligis akvon, kiun ŝi antaŭe devis ĉerpi ekstere, el la profunda puto, kies akvo vintre kelkfoje glaciigis.

Ĝis la akvo bolis, ŝi melkis pli ol dek bovinojn. Mi aŭdis la bruon de la lakto, kiu ŝprucis en la sitelon, ĉar la stalo de la bovinoj situis malantaŭ la muro de la dormĉambro. Poste, mi aŭskultis la kanzonon de la senkremigilo, kiun avino funkciigis. Samtempe, ŝi filtris kafon kaj varmigis supon, kiun miaj onkloj manĝis. Mi aŭdis ŝiajn paŝojn sur la cemento de la manĝoĉambro, poste sur la tera planko en la kuirejo, la bruon de bovloj, teleroj, kuleroj, tranĉiloj kaj manĝaĵoj (butero, pano, pasteĉo*) sur la tablo el dika ligno.

Kaj ŝi vokis: "Youen! Fanch! Poeneo" (Estas tempo por!). Fanch dormis en la subtegmento; Youen en la ŝranklito de la manĝoĉambro. Mi ridetis, aŭdante gruntojn*, grumblojn* de tiuj junuloj, kiuj tute ne miris, ke la maljunulino pli frue laboris. Sed kutime oni diris, pri virinoj, kiuj "nur" mastrumis: "Ŝi faras nenion". Kelkfoje ŝi devis realvoki tiujn pigrajn dormantojn. Ellitiĝinte, ili ŝprucmakulis per iomete da akvo el pelveto siajn nazojn kaj vangojn. Tio estis la matena tualeteto!

Ili sidiĝis ĉe la tablo kaj gluteme matenmanĝis. Avino estis la servistino, la servutulo, kiu starante trinkis kafon kaj tuj surtabligis tion kion ili petis. Dum ŝi lavis la vazaron, ili kviete fumis babilante. Mi spiris la bonan odoron de kafo kaj cigaredoj, kaj la freŝan aeron kiam finfine ili eliris, lasante la pordon tute malfermita.

Mi provis kompreni, kion ili diris ekstere, kion ili faris. Ho! Ili zorgis ofte pri ĉevaloj, kiujn ili multe ŝatis kaj ofte laborigis. "Mamm! Ni estos en Park Bras por tranĉi maljunajn arbojn. Venu senprokraste por fari faskojn*!" Kaj fajfante, ili elrajdis. Mia avino mastrumis rapide, zorgis pri mi kaj pri miaj kvar fratinoj kiuj dormis en la subtegmento, zorgis pri kaprinoj, gekokoj, rekovris fajron per cindro por konservi ardaĵojn. Kaj poste, ni piede rapide iris al Park Bras kaj helpis iomete avinon, provis faskigadon, dum la tuta mateno. Kelkfoje, miaj onkloj haltis por ripozi, sed ŝi kaj ni...ne! Kiam ŝi diris "Mi reiras por prepari tagmanĝon, Daŭrigu faskigadon!", mi proponis kuniri. Preskaŭ kurante, ni revenis hejmen por kuiri legomojn. Sed unue necesis eliti ilin el la ĝardeno kaj ŝi devis relumigi la fajron. La duono de la tago ankoraŭ ne finiĝis kaj mi iom laciĝis. Kaj ŝi? Ŝi diris nenion!

Marthe Poher

Tiu bretona samideanino redaktis tiun artikolon, nur kelkajn semajnojn antaŭ sia forpaso

*latuno: laiton, cuire jaune

*pasteĉo: pâté

*grunti: grogner (comme un porc)

*grumbli: grommeler, ronchonner

*fasko: botte (de paille), fagot

LA BIRDA EDZIĜFESTO

La birda edziĝfestoj, la 25an de Januaro, estas populara soraba antaŭprintempa kutimo. Onidire, tiun tagon la pigo ("sroka") kaj la korvo ("hawron") geedziĝas. Ĝis la kvindekaj jaroj de la 20-a jarcento tiu kutimo estis flegata nur en la suprasoraba lingva regiono. Per konscia flegado en lernejoj kaj infanejoj, dum la tempo de la Germana Demokratia Respubliko (1949 - 1990), la birda edziĝfestoj baldaŭ akiris grandan plaĉon en la tuta germana-soraba regiono.

La 25a de Januaro estas ĝojfestoj por infanoj. Ili metas malplenajn telerojn en malfermitan fenestron kaj ricevas kaŝe donacojn kiel pastobirdojn kaj dolĉaĵojn de la onidira edziĝfesta festeno. Per tio, oni rekompencas la infanojn por ilia amo al bestoj kaj ilia disĵetado de nutraĵo. En multaj infanejoj, la infanoj akompanas la kutimon per kultura programo, dum kiu ili maskas sin kiel birdoj aŭ prezentas soraban edziĝfestan procesion. Tien gepatroj kaj konatoj estas invitataj.

La origino de ĉi tiu kutimo estas malfacila. Ĝi estas verŝajne postrestaĵo de mitaj imagoj. Dum antaŭkristanisma tempo, oni disdonis manĝoferojn al la fantomoj de la praŭloj por gajni la favoron de naturdioj kaj demonoj. La sezona evoluo en faŭno kaj flatro montras rilaton al la dato: ĉirkaŭ la 25a de januaro, kelkaj birdospecioj komencas nesti aŭ metas ovojn. Krome, tiutempe, la suko altiĝas en la arboj. La 25a de januaro (konvertiĝo de sankta Paŭlo) estis festata iam kiel mezo de la vintro, dum la 16a jarcento eĉ kiel fino de la vintro.

Fine de la 19a jarcento, sorabaj societoj komencis regule aranĝi societemajn vesperojn kiel la sorabe tiel nomata "ptaĉi kwas", la birda edziĝfestoj. Post la 2a mondmilito oni revivigis tiujn ŝatatajn aranĝojn. La Soraba Popola Ensemblo ĉiujare prezentas grandajn podiajn programojn por infanoj kaj plenkreskuloj okaze de la birda edziĝfestoj. Vizito de tiuj aranĝoj estas same ŝatata de junuloj kaj maljunuloj.

Soraba Muzeo Bautzen (Budyšin)
Trdukita de Michael Wolf (Neustadt)

El Vortaro "Grand Larousse": Sorabes ou Serbes de Lusace: Slaves de Lusace, que les Allemands appelaient Wendes. Ce sont les descendants des Slaves polabes, c'est-à-dire de l'Elbe, qui habitaient une grande partie de l'Allemagne Orientale; ils ne sont plus que 160.000 environ sur le cours supérieur de la Spree.
La "soraba" lingvo estas slava; ĝi estas ankoraŭ parolata

Nia amiko Christian LEVESQUE sendis al ni ĉi-suban artikoleon kiu starigas gravajn humanajn kaj filozofiajn problemojn pri vivo kaj morto, pri kvalito de vivo, pri eŭtanazio, pri nemildigitaj suferoj, pri naskiĝo de infano grave handikapita, pri alzheimer malsanuloj kaj aliaj tragediaj situacioj kiuj povas okazi en ĉiuj familioj. Ĉu vivoj estas ĉiam vivindaj? Jen demando farita al la konscienco de ĉiu

MIA PATRINO

Mia patrino estas centjara kaj mi pripensas pri tio.

Ĉu estas bona afero?

Certe, kiel ĉiuj, mi amas mian patrinon. Oni povas pensi ke por viro, preskaŭ 70-jara, estas bone ankoraŭ havi la virinon kiu naskis lin.

Tre maljuniĝi estas dezirinda sed ĉu bona sano ne estas la plejbono? Bedaŭrinde, plej ofte maljuniĝo alportas pli kaj pli da malsanoj!

Mia patrino ne plu vidas. Ŝi urinas en lito. Ŝi malfacile parolas. Ŝi ne plu povas marŝi.

Ŝi vivas hejme, helpata de dommastrinoj.

Flegistinoj ŝi bezonas por reenlitigo, por medikamentoj kaj aliaj bezonoj.

Ĉu vivo en tiaj kondiĉoj estas valora? Mi ne kredas sed kion fari?

Nur atendi, tago post tago ke morto forprenu ŝin...

Tio ne estas ĝoja afero ĉu ne? Ĉu vi ne pensas ke estas la kazo de multaj maljunuloj?

Kristiano


LE BÉLIER HYDRAULIQUE (La Batpumpilo?)

Verŝajne ni ĉiuj rimarkis en kelkaj domaj akvodistribujaj tubaroj, mallongdaŭran fortan bruon kaj skvon, kiam oni abrupte fermas forte fluantan kranon. Tiu fenomeno nomiĝas akvobato (PIV) (en la franca: "Coup de bélier").

En 1792, la fratoj Montgolfier, fame konataj pro la unuaj aerostatoj, interesiĝis pri tiu fenomeno kaj realigis aparaton kapablan ĝin uzi por grandakvante kaj alte suprenpuŝi akvon, sen provizo de energio, sen interveno de homo, kaj kun minimuma prizorgado. Estis la "batpumpilo" (Bélier hydraulique), tre uzata de la terkultivistoj ĝis la unua duono de la 20-a jarcento.


1^o) Principo: Estu la aranĝaro de la ĉi apuda figuro 1.

- Se oni apertas la kranon K, akvo fluo instaligis en la tubo T kun difinita rapideco, tio estas kun difinita kineta energio.
- Se oni abrupte fermas la kranon, la elfluo ĉesas, kaj ĝia nephuŝita kineta energio transformiĝas je skvo en la tubo T, kiu povas esti difektita.



2^o) Ni aldonu vertikalan travideblan tubon VT ĵus antaŭ kaj super la krano (fig. 2), komunikantan kun la tubo T. Oni konstataas:

- kiam K estas apertita, akvo fluas el ĝi, kaj neniu akvo supreniras en VT.
- se oni rapide fermas K, akvo abrupte supreniras en VT, kaj tuj poste, komencas resobiri.
- la akvobato ne okazas: la kineta energio de la akvo estis uzita por suprenpuŝi akvon en VT.



3^o) Ni aldonu klapon ĉebaze de VT, kiu malebligas la resobiron de la suprenirinta akvo. Se tiam ni plurfoje apertas kaj fermas la kranon K, ĉiufoje iom da akvo aldoniĝos en VT. La kvanto da akvo kiun oni povas tiel suprenpuŝi, kaj la alteco je kiu oni povas ĝin levi, dependas de la niveldiferenco N kaj de la diametro de la tubo T.

4^o) Endas rimarki:

- ke la nivelo ĝis kiu oni povas levi akvon en VT multe superas tiun de la fonto.
- ke oni "perdas" akvon kiam la krano estas apertita por krei la batodonan fluon. Tio forte reduktas la rendimenton de la sistemo: eble maksimume 2/10 de la akvo de la fonto povos esti levita ĝis la dezirata nivelo.
- ke por funkciigi la principan aparaton tie priskribitan, oni devas uzi la energion de manipulado de la krano. Sed aldonante diversaj organoj inter kiuj valvoj, en la praktika aparato, ebligas ĉion obteni aŭtomate per la nura forto de la falanta akvo.

Se vi volas pliajn informojn: INTERRETO.

5^o) Rimarko: en la lingvoj kiujn mi povis kontroli, t.e. la angla, hispana, itala, portugala, rusa kaj germana, mi konstatis ke ĉiuj, krom la germana, uzis la samajn bildojn kiel la franca de "coup de bélier" kaj "bélier hydraulique". Krome, la ideo de "bélier de guerre pour abattre murs et portes" estas nur konfuze tradukita (GDFE) aŭ netrovebla en PIV.

STUDI ESPERANTON ESTAS BONE SUBTENI ESPERANTISTAJN ASOCIOJN ESTAS NECESEGE

Se vi deziras aktivi por disvastigo de Esperanto, nepre aliĝu naciajn kaj internaciajn asociojn. Vi legu, ĉi-sube la celojn de la plej gravaj asocioj de Esperanto-Movado

UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO estis fondita la 28an de Aprilo 1908. Ĝi celas :

- a)-Disvastigi la uzadon de la internacia lingvo Esperanto
- b)-agadi por la solvo de la lingva problemo en internaciaj rilatoj kaj faciligi la internacian komunikadon
- c)-plifaciligi ĉiuspecajn spiritaĵojn kaj materiajn rilatojn inter homoj, malgraŭ diferencoj de nacieco, raso, sekso, religio, politiko aŭ lingvo
- ĉ)-kreskigi inter siaj membroj fortikan senton de solidaro, kaj disvolvi ĉe ili la komprenon kaj estimon por aliaj popoloj

La organo de UEA estas la revuo "ESPRANTO"

ESPERANTO-FRANCE (U.F.E.) est la section française d'UEA. Son but est de :

- Promouvoir en France l'enseignement et l'utilisation de la Langue Internationale Esperanto, langue dont les bases ont été formulées par le Dr Zamenhof dans l'ouvrage intitulé *Fundamento de Esperanto* et dont l'évolution est assurée par une riche littérature contrôlée par l'Académie d'Espéranto
- Coordonner les efforts des différentes structures associatives pour la promotion de l'Espéranto en France
- Regrouper les personnes physiques poursuivant les mêmes buts

Esperanto-France est neutre à l'égard de toute opinion politique, philosophique, religieuse ou syndicale.

Esperanto-France est solidaire de la Déclaration Universelle des Droits de l'Homme et souscrit à ses principes de justice et de fraternité entre tous les peuples..... Le droit à l'égalité linguistique, le droit à la dignité et à l'absence de discrimination dans les domaines de la communication, de l'éducation et de la culture sont considérés par Esperanto-France comme des droits de l'homme à part entière

La organo de Esperanto-France estas la revuo : "Le Monde de l'Espéranto"

SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA (SAT) a été fondée à Prague en 1921.

Anationale, SAT a adopté d'emblée une langue de travail unique dont la valeur a été reconnue par des personnalités éminentes et par des organisations internationales : l'Espéranto

L'Espéranto offre à l'échelle mondiale le lien par lequel peut naître et se développer une conscience mondialiste, un sentiment d'appartenance à cette mosaïque humaine complexe dont chacune des composantes doit être respectée et harmonieusement valorisée, l'humanité.

SAT vise l'application pratique de l'Espéranto à l'échelle mondiale à des fins de progrès social, d'émancipation des populations.

Unique par ses buts, sa structure, son mode de fonctionnement et de communication, SAT (Association Mondiale Anationale) apporte une réponse concrète et pratique à des idées exprimées par l'écrivain Henri Barbusse:

"Le dialogue sincère de deux hommes officiellement ennemis parce qu'appartenant à deux pays différents fait ressortir fatalement tout le mensonge social. Si modeste qu'il paraisse, au milieu de tout l'épanouissement des grandes idées de fraternité et de raison, l'apport de la langue internationale est d'un ordre immédiat et pratique incomparable."

C'est ce qui explique pourquoi SAT n'a jamais eu la faveur des régimes pour lesquels le mensonge est un principe de gouvernement. SAT est absolument indépendant de tout parti politique.

La organo de SAT estas "Sennaciulo" (Le sans nation)

SAT-AMIKARO a pour terrain d'action les territoires de langue française

Alors que SAT vise l'application pratique de l'Espéranto, et se compose de ce fait d'adhérents parlant cette langue le rôle de diffusion de l'Espéranto incombe à des organisations liées à SAT par une convention.

Le champ d'activités de ces organisations s'étend non point en fonction des frontières nationales mais des zones linguistiques. Pour la francophonie, ce rôle revient à SAT-Amikaro (Les Amis, ou l'Amicale, de SAT)

SAT Amikaro a pour objectif de mettre l'Espéranto plus particulièrement au service des personnes pour lesquelles cette langue présente en premier lieu un intérêt d'ordre social, pédagogique, culturel et pratique.

SAT-Amikaro se donne aussi pour tâche d'ouvrir l'accès à SAT aux personnes qui, par la connaissance de l'Espéranto, désirent étendre l'horizon de leurs connaissances, accroître leurs possibilités d'échanges internationaux et participer, de manière active et constructive à l'évolution du monde.

SAT-Amikaro se spécialise donc dans trois secteurs essentiels : information, enseignement, édition de matériel d'information, de documentation et d'étude, service librairie

La organo de SAT-Amikaro estas "La Sago"